

# La leondresisto



Willem Elsschot

---

# La leondresisto

---

# **La leondresisto**

**Willem Elsschot**

---

# La leondresisto

## Eldono de Flandra Esperanto-Ligo

Tiu ĉi bitlibro rajtas esti kopiita nur al la komputilo kaj/aŭ librolegilo de la aĉetinto. Transdoni la libron al aliaj estas kontraŭleĝe kaj malhoneste al la aŭtoro kaj/aŭ tradukinto kaj/aŭ ilustrinto kaj/aŭ eldoninto, kiuj tiel ne estas rekompencataj pro sia krea laboro.

---

# 1

Kara Valtero,

Mi skribas al vi hodiaŭ, por ke vi sciu, ke via patro ne forgesis vian dudekan naskiĝtagon. Ĉu mi gratulu vin? La bato de tiu jarsonorilo tamen ne estas tre ĝojiga. Koncerne tiun eternan kravaton – ankaŭ ĉi-foje mi ne havis pli bonan ideon – tiu estos enmanigata de via patrino persone, kaj certe ne sen komentario. Sed mi anticipe diras al vi, ke mi apenaŭ kulpas, kaj mi certigas, ke mia konduto estas sufiĉe neriproĉebla. Kion oni nomas *'fair average'*<sup>1'</sup> en la grenkomerco. La maksimumon oni ne povas postuli de mi, ĉu ne? Nun pri via patrino, ŝi foriros lundon, por surloke kontroli ĉu la lastaj ses monatoj en Parizo ne damaĝis vin korpe kaj anime, kaj ĉu vi estas prizorgata de ŝia fama fratino, ĉar ŝi ja opinias, ke junulo kiel vi estu prizorgata. Vi do estas avertita, kaj vi ankoraŭ havas tempon por lavi viajn piedojn, viziti la friziston kaj embuskigi vian

artilerion se via tagprogramo enhavas eĉ nur iom da flirtado. Kaj ĉiam kiam temos pri via patro, vi klopodu interveni kvietigante.

Kaj nun al la temo. Vi ja sciu, Valtero, ke via patrino ne venos sole, sed ke via trijaraĝa neveto, kiu venis el Dancigo por viziti, kunvojaĝos. Kaj Joĉjo, por nomi lin, maturiĝis post sia lasta vizito, tion mi povas certigi al vi. Mi ne tiom celas aspekte kaj volumene, ĉar post duono da jaro tio malmulte ŝanĝiĝas, kaj li ankoraŭ havas siajn buklojn, estu certa, sed pli la konsternite rapidan evoluon de lia penskapablo kaj lia oratora talento.

Vi scias, ke antaŭ ses monatoj li ankoraŭ kontentiĝis je sensencaj demandoj, tiel interrompante kiel vipfajfado de najtingalo. Nu, tiu fazo finiĝis kaj ĝi bedaŭrinde provizore ne revenos. Ĉar lia esplordemandado nuntempe ne nur abundas je kaŝitaj kaptiloj kaj trompoj, sed li daŭrigas ĝis mi fuĝas, kaj fuĝi ne eblas kiam neniu estas hejme, ĉar mi ne kuraĝas

lasi lin sola. Nepre ne ridu nun, ĉar mi povas certigi vin, ke vi tute ne konscias pri kio atendas vin kiam via panjo kaj onjo kurvizitados la Parizajn butikojn kaj kiam vi do fojfoje estos sola kun tiu friponeto.

Sed seka teorio ne konvinkas, kaj mi do ne pli efike povus agi, ol sendi al vi fidelan raporton pri interparolado kiun mi hodiaŭ posttagmeze havis kun tiu sinjoro dum via amata patrino en la urbo surpravis robon. Komenciĝis kiam la stratpordo klakfermiĝis malantaŭ ŝi, kaj se ŝi post du horoj ne estus reveninta, certe pelita de malsato, tiam ĉi tiu letero ne estus finskribita hodiaŭ.

Kiel ĉiam, li iris rekte al sia celo sen iu indulgo pri miaj okupoj. Ĉar la klako de nia pordego apenaŭ estis formortinta, kiam li forĵetis sian ŝovelilon en la herbon, forviŝis ion sub sia nazo, alrigardis min kvazaŭ por diri 'nun ni estas pretaj', kaj post tio li surtabligis sian unuan ludkarton. Li ja ne palpebrumis, sed tamen estis io tia en lia rigardo.



'Ĉu la leono estas tiel granda kiel la mondo?'

Se mi denove estu la viktimo, tiam mi certe preferas lian leonon, ĉar mi mem ankoraŭ ne estas sufiĉe mondumigita por ne plu havi troaĵon da respekto por la terurulo de la dezerto. Kaj do ek al tiu besto. Mi ne longe marĉandas.

'Ne', mi deklaras, tiel memfide kvazaŭ mi efektive komparis la universon al la leono Reĝo Nobelo. Kaj, suspirante, mi fermas mian libron.

Mi diris 'ne', ĉar estas vere kaj mallonge, krome ĉar li ŝatas efikajn replikojn. Li malŝatas eviti. Laŭ lia konstitucio, io devas esti granda aŭ malgranda, forta aŭ malforta, varmega aŭ malvarma, peza aŭ malpeza, ĉar li opinias, ke nuancoj nenecese komplikas lian mondon. Li zorgas, ke la grandeco regu, la forteco subpremu, la varmego bruligu kaj la pezeco frakasu, kaj la malgrandaj, malfortaj, malvarmaj kaj malpezaj nur ekzistas por trasuferi ĉion ĉi.

Kaj li mem estas la esenco ĉirkaŭ kiu ĉio ekmovas.

Sed kiom ajn mia 'ne' estis efika, li aspektas acide malkontenta, kaj daŭras iom da tempo antaŭ ol mi komprenas, ke tiu superba vero ne plaĉas al li.

Ĉi-foje ankaŭ estas certe tro vere kaj mi do spontanee reĝustigas.

'Jes, Johano, la leono *estas* same granda kiel la mondo.'

Mi familiare uzis lian nomon kun leĝera tremsono, esperante igi lin favora kaj ĉi-foje mi donas al li samtempe plenan buŝon, ne simple dirante 'jes', ĉar tio, post mia 'ne', sonus iom malsprite. Kaj li nepre pensu, ke mi sen io plu elbabilas, aliokaze li min traktus same kiel la dompurigistino, kiu tute ne respondas kaj pluviŝpurigas. Mi do spontanee aldonas al ĉi tiu 'jes' lian tutan propran demandon, kun leono kaj ĉio, kaj eĉ troigitan jesan tonon, por ke li almenaŭ ricevu la impreson, ke ĉi tiu dua, tute kontraŭa respondo, estas la konkludo

de pli profunda konsidero, kaj samtempe por eviti ke li ree insistu pri konfirmo. Mi ne perdu tempon. Ju malpli li bezonos ripeti, des pli rapide li atingos la finon de sia rozario.

Mia malmodesta certeco tamen ŝajnas ankoraŭ ne komplete kontentigi lin.

'Pli granda?'

Ŝajnas, ke li tre bone scias, ke du objektoj neniam estas ekzakte same grandaj, ke do ankaŭ ĉi-okaze unu el ambaŭ verŝajne estas iom pli granda. Mi eĉ konjektas, ke lia konvinko pri la proporcio de leono al mondo jam firme staris antaŭ ol li demandis, ĉu la unua estas tiel granda kiel la alia. Lia unua demando estis nur enkonduka alegro. Li nur ŝajnigis dubi, por ne influi min je la elekto de mia respondo. Ĉar li neniam povas tiom multe ĝoji pro opinio, kvazaŭ de si mem diktita, kiom pro la libera esprimo de mia opinio, se tiu almenaŭ ne kolizias kun lia stranga regado de lia ne malpli stranga kreaĵo. Kaj per niaj

ĉiutagaj ekzercoj, mi iom ekkomprenas la difinojn de lia 'Granda Ĉarto'<sup>2</sup>. Mi nepre scias, ke mi nun ne povas dubi inter tiu pozitiva, elprovita leono kaj la abstrakta mondo, aliokaze la afero tuj fiaskos. Lia demando cetere iom similas al ordono. Mi aŭdas lin pripensi: 'Kuraĝu vi, per via kompleta kuraĝo, opinii, ke tiu leono ja estas pli malgranda.' Kaj mi rifuzas esti nun mem formanĝegota. Ĉar li konscias, ke al iu kiun oni povas tiel facile persvadi de 'ne' al 'jes', oni sen protesto povas doni duan ŝoton je lia postaĵo.

'Jes, pli granda', mi hezitate konsentas.

Li momente ĝuas sian venkon kaj tiun de sia leono, tiel ke mi jam ekprenis mian libron.

'Se Johano metas leonon ĉe la germanoj, kio do okazas?'

Kiajn malicaĵoj jam post la Traktato de Versajlo estas faritaj kontraŭ tiu kompatinda Germanujo. Post tiu amaso da vulturoj, nun ankoraŭ tiu leono. Mi ja

respondus, ke la germanoj loĝigus lian leonon je *Hagenbeck*<sup>3</sup>, sed mi ne kuraĝas. La prestiĝo de tiu besto min tute paralizas.

'Tiam estas grava, Johano', mi certigas per zorgoplena mieno.

Li opinias ke 'grava' estas tro malpreciza kaj absolute malsufiĉa.

'Kion do diras la germanoj?'

'Nenion, Johano, ili forkuras.'

Ĉu li eble intencis iom trompi min? Kvazaŭ li iam permesus, ke tiuj germanoj simple pervorte reagu al la abrupta apero de lia leono. Tiam ili tuj povus resti sidantaj kaj plu drinki. Ne, vole nevole, mi minimume ekforirigu tiujn homojn, kiel ajn militemaj ili ja estas, aŭ mi kaj lia Moŝto certe ekkverelus. Ĉar tiu 'diras' de tiuj germanoj nur estas la enkonduko de multe pli severa aflikto, kiun li pretigus por ili, sed kiun li ne subite malkaŝas, ĉar li antaŭe iom volas palpi al mi la pulson. Cent-elcente leoninklina, aŭ li emeritigus min.

Lia malbonhumora rigardo direktiĝas malproksime. Ne plaĉas al li, ke tiuj germanoj, per uzo de siaj kruroj, forturnos la faton.

'Kial ili forkuras?'

Sen devigi sin al io ajn, li jam tuj volas aŭdi klarigon, ke ĉi tiu kurado ne estas nur por plezuro, sed ke ĝi havas pli profundan kaŭzon. Kaj ke tio ne estu serĉota ekster la dentoj kaj ungegoj de tia besto, mi ja scias pri tio, ĉar estas skribite en Ĉapitro Unu. Mi cetere sentas min dresata kaj komplete reduktata al nulo.

'Ĉar ili timas', mi rezignacie konfesas.

Li iomete kuntiras siajn ekaperantajn brovojn, certe ĉar, laŭ li, mia senŝarĝigo tro malrapide progresas.

'Kial ili timas?'

Kaj preskaŭ flustre, kvazaŭ por kuraĝigi min:

'Ĉu la leono formanĝas la germanojn?'

Lamentadon li volas aŭdi, sangon li volas

vidi, aliokaze lia leono estus enstaligata dum siaj ceteraj vivtagoj. Sed Johano devas poste studi geografion, kaj li sciu, ke la tuta formangêgo de ĉiuj germanoj eĉ por leono estas tro malfacile digestebla, almenaŭ dum unu manĝo. Mi do riskos nur, ĉar estas por lia bonfarto.

'Formanĝi? Jes, Johano, almenaŭ kelkajn.'

'Kio estas tio?'

Mi ventanime ellasis tion, kaj nun li volas senprokraste scii, kion signifas tiu suspekta 'kelkajn', kiu nun ne decas laŭ li, kaj li volas kontroli ĉu eble ne estas besto, aŭ io alia, kiu povus subfosi lian leonon, por eventuale tuj interveni.

'Kio?', mi ree demandas por gajni tempon, ĉar mi vere ne scias kiel mi devas enkapigi al li la nocion 'kelkajn'. Sed li absolute ne ŝatas tiun kontraŭdemandon.

'Avĉjo devas diri tion.'

Mi montras mediteman, severe sulkan vizaĝon kiel vera Arkimedo, kaj nun

neatendite evidentiĝas, ke mia mieno lin kontentigas. Ĉu mi posedas ion de la malmildeco de leono, aŭ ĉu li jam antaŭe sciis, ke malmultaj rezultoj estu atendotaj de mia serĉado? Li almenaŭ ne plue persistas kaj lasas min esti embarasita, kiel taŭgas al mi, pro tiu 'kelkajn'. La ĉefafero por li certe estas, ke lia leono volonte manĝas germanojn kaj la formanĝado estas komencita. Kaj post mallonga sekvado de la unua fazo de la formanĝegado:

'Kiam la leono batalas kontraŭ ĉevalo, kiu tiam gajnas?'

'La leono', mi malestime klarigas, ĉar tio estas laŭ mi demando eĉ ne inda fari.

'Kaj la ĉevalo?'

Li volas, ke la mizera fino de tiu ĉevalo por la tioma fojo konfirmu la venkon de lia leono.

'Tiu perdas.'

Jes, mi devintus antaŭvidi tion. Li pli bone ol mi scias, ke la ĉevalo devas esti la



viktimo, sed atendis el mia buŝo mitralartilerion, flusegon da babiladaj verboj dum kiuj tiu ĉevalo senprokraste estu detruota. Kaj por fini, mallaŭdan grimacon. Li tamen trovas ke perdi estas neinda, ĉar kiu simple perdas sekvontan fojon ja povus gajni, kaj tiu penso mem jam estas majest-atenco. Li ankaŭ decidis, en la fundo de sia animo, ke lia ĉevalo ne ricevos ŝancon por recidivi, almenaŭ ne hodiaŭ.

'Ĉu la leono ne formanĝas la ĉevalon?'

Estos ripetado de la okazintaĵo pri niaj germanaj fratoj, kaj tia 'ne' signifas ke mi tion jam delonge propramove povus esti dirinta. Kaj denove tiu iritita tono.

'Sed, Johano, li ja ne plu povas manĝi ĉar li jam formanĝis ĉiujn tiujn germanojn.' Mi opinias, ke frutempa kompreno de logiko ne damaĝos lin, kaj li vere ŝajnas kompreni ke estas io taŭga ene, tamen sen rezigni eĉ momente je la aksiomo de la fina formanĝego.

'Ĉu la leono do formanĝas la ĉevalon kiam

estas mallume?’ Kiam ĉiuj tiuj germanoj estos digestitaj, li celas. La aŭtodafeo<sup>4</sup> de la inkvizicio estas prokrastita por momento, sed estos plenumita. Li tamen donas iom da prokrasto al sia leono, ĉar nun estas nur la kvara kaj ankoraŭ taglumo.

Ŝajnas al mi, ke lia indulgo meritas rekompenco; mi do rehonorigas lian leonon kaj ja radikale faros finon al tiu teda ĉevalo.

‘Jes, kiam estas mallume, la leono kaptas la ĉevalon, skuas ĝin energie, dispecigas ĝin, formanĝas ĝin kaj purigas lekante la plankon.’

‘Nur la voston li lasas’, mi ankoraŭ diras, por iomete malseverigi tiun sangmakulitan scenon, ĉar mi timas ke pedagogie estus nek orta nek orda. Cetere, ja povas resti *io* de tiu kompatinda ĉevalo.

Li pensas pri nia vosto, kiu ŝajne tedas lin, kaj ŝajnas absolute ne kompreni kial tiu alpendaĵo dum nedifinita tempo devus postresti sur la leke purigata planko kiel

ĝena postmorto. Eble li ankaŭ opinias ke tiu ĉeval-kaj-leon-sceno ne povas fini se tiu vosto ankoraŭ kuŝas tie. Kaj malantaŭ liaj kulisoj estas ankoraŭ grandnombraj matadoroj piedfrapantaj.

'Kial la leono ne formanĝas la voston?'

Antaŭ ol eventuale mem ordigi tiun restaĵon, li volas scii, ĉu ne ekzistas iu ajn akceptebla senkulpigo pro la nekompleta formanĝado de nia mortinta ĉevalo, ĉar li deziras, ke lia leono aspektu perfekta en siaj agoj kaj faroj, nepre en siaj agoj. Kiom tiu besto perdis de sia prestiĝo, tio estas la demando.

'Ĉar la haroj tiklus en ĝia gorgo.'

Estas iom malforta kiel klarigo, sed mi ĉi-momente nenion pli bonan trovas. Mi do ankaŭ vidas ke li, el la vidpunkto de sia leono, trovas ke estas malaltvalora agmaniero, neklarigebla malperfektaĵo, ofica devopreterlaso, ĉar li decidis aranĝi tiun nesolvitan vosto-aferon poste hodiaŭ, formetas abrupte voston kaj leonon, kaj

kiel distraĵo lasas enviciĝi kelkajn el siaj vapormonstroj.

'Kaj se la maŝino de la trajno interbatalus kun la strat-rul-premilo?'

Fojfoje plumpa koloso tia venas skuante sur la pavimŝtonoj de nia strato. Ĝi iom fajroĵetas kaj violente muĝigas la murojn, tion mi devas konfesi. Sed tamen mi ne komprenas kiamaniere li elpensas subite ekbataligi ĝin kontraŭ sia lokomotivo, kiu ja estas lia unua grandpezula ĉampiono. Ĉu la objekto aspektas al li en nia mallarĝa strato pli granda ol ĝi efektive estas, aŭ ĉu la maldelikata strat-rulpremilo meritas sian prestiĝon pro sia nura brueco? Se tiuj du do interbatalas, kiu tiam venkas? Li eĉ ne plu demandas, kvazaŭ li opinias, ke mi nun devas havi sufiĉe da sperto por povi diveni tiun parton de liaj demandoj.

'Tiam la maŝino de la trajno gajnas', mi facilanime deklaras. Ĉar doni ŝancon al tia mizera strat-rulpremilo en tiu unua raŭndo estas por mi neimageble.

Ŝajnas, bedaŭrinde, ke tio ne superas lian atendon. Jes, lia strat-rulpremilo denove estas ia novaĵo kaj devas servi dum kelka tempo. Mi do rapide komprenas ke tiu heroa provokulo tro senĝene estis traktata de mi. Ke tiu ŝoserulilo ne klare gajnu eble ne malplaĉas al sinjoro, sed tiu kiu speciale estas vokita de li por batali kontraŭ tiu imponega lokomotivo, tiu meritas ĉiaokaze altestimon, estante el distingita deveno. Subite mi ricevas kapricon por tuj superŝuti per honoroj tiun malĝentilan traktadon. Kaj kiel ĉiam mi ekstroigas.

'Ne, Johano, tiam gajnas la strat-rulpremilo.' Kial fakte ne, se tio pli plaĉas al li?

Sed lia mieno restas repuŝa. Mia abrupta plenŝanĝo aspektas al li ekstreme suspekta, kaj krome li konsideras kiel arogantaĵo, ke mi permesas min memstare verdikti tian neatenditan knokaŭton por lia lokomotivo. Ŝajnas, ke li tediĝas de miaj pedantaj verdiktoj kiuj estas tro ŝanĝiĝemaj. Kion fari nun? Tiu renkonto do ne povas pasi sen

sekvoj, ĉu? Jen la sporto inspiras ion al mi. Kial ne *draw*<sup>5</sup> aŭ *dead heat*<sup>6</sup>? Sed tiam tuj, se ne li opinius, ke mi estas ridinda.

'La maŝino de la trajno venas de tie kaj la strat-rulpremilo de tie. Pli proksimen kaj pli proksimen. Atentu, ĉar ili kolizias unu kontraŭ la alia. Tarataĝin! Bum! Kaj ili ambaŭ haltas.'

Li atente sekvas la spektaklon de tiuj du monstroj, rigardas min fikse kvazaŭ li ne certas ke mi efektive tion opinias, tamen ne estas malkontenta ĉar mi tiom bruegis pri tiuj onomatopeoj kaj denove konkludas prokrasti la esploron de la vera disvolviĝo, pro Dio, ĝis ĉi-vespere, ĉar neatendite li garaĝas la maŝinon kaj la strat-rulpremilon ĉe la vosto kaj leono kaj ĵetas esploran rigardon al la malgrasa silueto de sia praavo kiu faras sian eniron. Li promenis kaj eniris momenton por kontroli ĉu ni ĉiuj ankoraŭ vivas. Vidante sian pranepojn, li ricevas larmojn en la okuloj kaj li kore etendas sian pezan ĉarpentist-manon, ektimigindan manon, manon kiu mem

ankoraŭ foje ricevos rolon en unu el niaj venontaj turniroj, sen la resto de praavo.

Pro tiu karboŝovelilo Johano kelkajn paŝojn malantaŭen iras, ĉar li estas avara pri manpremo, alrigardas momente sian pli maljunan antagoniston kaj opinias ke li tamen indas je demando. Li almenaŭ denove elfosas sian strat-rulpremilon por li.

'Kaj se praavo estas dispremita de la strat-rulpremilo?'

Dio mia, la viro nur ĵus estas en la domo kaj li jam estas la viktimo. Li ja tro multe ridas kaj ploras. Se li do nenion plu povas diri al mi, li prefere fojfoje tondrofulme blasfemu aŭ faru ion alian kiu povus impresi, ĉar tia monstreto regule enmanigas naztukojn al li, kaj eĉ antaŭ ol la larmoj efektive aperas.

'Se praavo estos dispremita de la strat-rulpremilo, tiam li estas morta', mi amare deklaras.

'Kaj kion diras tiam la homoj?'

'Tiuĵ diras, ke estas bedaŭrinde.'

'Kaj kion diras do la ulo de la strat-rulpremilo tiam?'

Li do konsideras tiun ulon ne kiel parton de la vulgara amaso, kaj opinias ke tiu rajtas aparte sciigi sian opinion. Kaj li nepre volas scii kiamaniere la kulpulo mem reagos pri tiu prem-platiga surveturado.

'Tiu diras: damne, tie denove unu kuŝas sub mia maŝino.'

Nun atentu, Valtero. Li atingas sian celon laŭ malrekta vojo, en du ŝtupoj.

'*Kion* diras la viro?'

Tiu unua demando ne nur celas refoje aŭdi min diri 'damne', kio eksterordinare plaĉas al li kaj kiun li definitive estas transpreninta, sed ankaŭ min ripetigi la vorton 'maŝino', kion mi do ankaŭ faras, ĉar kiel mi povus supozi ke mi estas trompita de io kio apenaŭ superas nian tablotapiŝon? Mi do milde ripetas:

'Li diras: dammmne, denove unu sub mia maŝino.'



Kaj ĉar tio ĝojigas lin mi ĉi-foje lasas la *damne* ruliĝi sur ekstraj radoj.

Li enkasigas tiun tamburadon senhonte, kiel iu kiu opinias, ke li meritas tion. Kaj nun ke mi konfirmis tiun maŝinon tiel stulte, kaj eĉ en la ĉeesto de praavo, kiu daŭre ridetas:

'Kial li diras: mia maŝino?'

'Nu, Johano, ĉar li veturigas ĝin.' Ĉar en mia naiveco mi supozas, ke li deziras, ke mi pravigu tiun posesivon, ke mi pruvu la proprieton de tiu viro je tiu maŝino.

'Sed ne estas maŝino.'

'Kio do povus esti, Johano?' Ĉar certe ne estas leono, kaj mi ne ŝatas ke iu kiu jam iĝas kvarjara ne povas distingi siajn vivantajn de siaj mekanikaj ĉampionoj.'

Li ree rigardas kvazaŭ li havas vinagron en la mieno, ĉar li nepre ne donas al mi la rajton esplordemandi *lin*, kvazaŭ li konscias ke la agrabla tempo de demandado por mi definitive apartenas al la pasinteco.

'Ne', li ripetas obstine, 'estas ne maŝino.'

Mi do pravigas lin, kiom ajn min naŭzas la perforto de la vero.

'*Kompreneble* ne estas maŝino.'  
*Selbstredend*<sup>2</sup>, dirus la restantaj germanoj, sed ili silentas.

Pro la fakto ke mia agnosko ne estas sekvata de klarigo pri kio ĝi ja estas, li konkludas, ke mi ne scias, ĉar mi ĉiam spontanee liveras la maksimumon.

'Kio do ĝi estas? Ĉu avĉjo ne scias?'

Ne, diable, mi ne scias. Kaj mi rigardas en la okulojn de praavo, ĉu tiu eble scias, sed tie mi nur vidas larmojn. Larmoj pro feliĉo ĉar Johano tiel demandas, ĉar mi tiel energie respondas kaj ĉar Dio donas, ke li ankoraŭ ĝisvivu tion.

'Estas strat-rulpremilo', Joĉjo mallaŭte diras, kvazaŭ li hontas anstataŭ mi, ĉar tiu maljuna viro ĉeestas mian kadukiĝon. Kaj li prenas la naztukon el mia jako por ĝustatempe ĉesigi la larmojn.

Jes, ja estas strat-rulpremilo kaj ne maŝino. Se ili estus ĉiuj maŝinoj, kiel ni do povus arbitracii sen ke estu ĥaoso. Cetere, mi jam delonge devus pripensi ke nur unu maŝino ekzistas, nome la kolosa, krieganta, rapidega maŝino de la trajno, la glora lokomotivo.

Feliĉe, li min ne tro longe lasas konsternita.

'Avĉjo devas diri kion Johano diras kiam li vidas tion.'

'Kiam li vidas kion, knabo?' Ĉar mi tute konfuziĝas kaj misfartas kvazaŭ mi dum horoj kuŝis sub tiu strat-rulpremilo.

'Kiam li vidas ke la strat-rulpremilo dispremis praavon.'

Nun tiu honesta viro ekscios do sian propran funebran paroladon, kaj eble Johano ja aldonos kelkajn de niaj fulmotondroj.

Mi momente pripensos, ĉar kiam li parolas pri sia familio, mi duoble singarda devas esti, atenti iom da ceremoniaro kaj neniun

malkontentigi. Kaj mi vere ne scias kion li preferas: vekrii pro la grava perdo aŭ ĝojkrii pro la solideco de la dispremado. Sed mi ne faros la duan, ĉar la prestiĝo de praavo estas tiel jam sufiĉe trista. Praavo mem, kiu ne ricevas ajnan decidpovon, kvankam temas pri lia propra haŭto, ekentabakigas pipon. Li paciencie lasas aferojn iri, estante certa, ke la juniperbrando poste havos la lastan vorton.

Mi devas prezenti al Johano ion fortan. Io kiel kuratako de la bluaj husaroj<sup>8</sup>.

'Kiam li vidas ke la strat-rulpremilo dispremis praavon, tiam Johano nenion diras, sed ekkoleras. Li *tiel* rulas siajn okulojn, haltigas per unu mano la strat-rulpremilon, detrenegas per la alia mano tiun ulon de lia maŝino, ne, de lia strat-rulpremilo, platpremas lin kaj svingas lin trans Ejfelturo ĝis en Sejnon. *Voilà*<sup>9</sup>! Ĉar mi iom post iom klopodas konatigi al li Parizon menciante fojfoje Ejfelturon, Sejnon, katakombojn, vian onklinon kaj aliajn rimarkindaĵojn. Li do jam scias ke Sejno

estas fluida kiel Skeldo.

'Kion diras avĉjo?' Kompreneble la stranga  
'Voilà' kiun li suspektas.

'Nenion, Johano.'

Li akre rigardas min kvazaŭ por diri 'atentu,  
do'.

'Se Johano ĵetegas tiun viron en Sejnon, ĉu  
li tiam ne dronas?'

Mi pensas ke li ekmaltrankviliĝas pri la  
sorto de tiu viro, ne tiom pro la dronigo  
mem, ĉar liaj viktimoj estas multnombraj,  
sed ĉar li ne volas vidi tiun strat-  
rulpremilon eterne nmovebla. Kaj ĝi ja ne  
povas funkcii sen tiu viro. Jes, la viro devas  
esti helpota.

'Kiam li preskaŭ estas droninta kaj  
subakviĝante la lastan fojon faras klok-klok,  
tiam Johano elakvigas lin per la haroj,  
promesigas lin, ke li neniam plu faros tion,  
vi ja scias, tiam ankoraŭ piedbatas lin,  
residigas lin sur lia strat-rulpremo,  
trumpetas kaj lasas lin daŭrigi la

veturadon.’

Se li nun ne kontraŭas tiun daŭrigveturadon, tiam jam estas enordigita tiu strat-rulpremilo, ĉar ni ankoraŭ povus havi multon antaŭ ni. Sed pri tiu trumpeto mi devintus silenti, ĉar mi pensas ke li ie havas unu.

‘Kaj praavo?’ li hezite demandas, kvazaŭ li timas, ke tio povus esti rigardata kiel malforteco.

Virta knabo. Dum praavo nevideble kuŝis sub la strat-rulpremilo, estis ankoraŭ en ordo. Sed nun ke tiu premilo foriris, li ne bone kuraĝas rigardi la restaĵon. Ĉu estas io kio ankoraŭ havas formon, aŭ simple makulo, haŭto, unuvorte dua ĝena ĉevalvosto, kies ordigo povus doni denove amason da tedaĵo? Kaj kiam nun tiu ulo povis savi sian morteman korpon, ŝajnas, ke li volas ankaŭ restarigi nian platpremitan praavon. Sed tamen necesas atenti pri tia operacio, kaj estas ja plej bone unue iom antaŭkonsulti.

Mi maltrankvile mienas. Kaj, lispante, tiel ke nia surdeta viktimo certe nenion povas kompreni:

'Ĉu ni do resanigu praavon, Johano? Tiam li povos trinki glaseton.'

Li hezitas, sed tamen ne kuraĝas ĉeesti pli longe ĉe tiu kadavro. Li sin savas de la terura vero por akcepti rolon en la komedio de la resurekto.

'Ĉu onklo Karlo?' li proponas.

Estas nepardoneble, ke mi mem ne tuj pensis pri tiu kuracist-frato. Bravo, Johano. Kaj ekstaze mi premas la manojn de praavo, kiu sentas ke mi volas gratuli lin pro io aŭ alio, ĉar li solide repremas kaj mi vidas novajn larmojn.

Intertempe Johano ekvidis skatolon kies kovrilo estas ornamita de papilioj.

'Kio estas tio?'

'Papilioj.'

'Ĉu ili ankaŭ estas bestoj?'

'Jes, Johano.'

'Ĉu tiuj bestoj ankaŭ estas en la zoologia ĝardeno?'

'Certe, Johano.'

'Ĉu tiuj bestoj jam delonge estas ĝismorte morditaj de la leonoj kaj tigroj?'

'Jes, knabo, estu trankvila.'

'Kion diras avĉjo?'

Li denove opinias, ke tiu ĉi 'trankvila' estas tro. Tiuj bestoj estas ĝismorte morditaj aŭ ne, kaj fino.

'Ĉu la leonoj kaj tigroj povas feki kaj pisi en la zoologia ĝardeno?'

Tiu ŝanĝo surprizas min, kaj mi zorgoplene demandas min, kial li tiel subite enscenigas siajn noblajn leonojn farante tian groteskan agon. Tamen ne hereda diboĉeco, ĉu? Kaj la teorio de heredeco min cerbumigas, ĉar mi spertis multon en mia vivo, je ĉia tereno. Kaj laŭ tio kio estas malkaŝita, miaj pragepatroj ne estis pli bonaj. Ĉiuokaze lia vortaro devas estas purigota. Tamen mi



decide diras jes, ĉar la vero antaŭ ĉio.

'Laŭ kiuj ili rajtas feki kaj pisi?'

'Laŭ la mastroj, Johano.'

Iomete surda kaj fumanta, praavo staras observante, atendente la glaseton de juniperbrando. Li pasis momente ĉe nia bufedo, sed sensukcese reiris, ĉar li volas ricevi sed ne preni.

'Kial Johano ne rajtas feki kaj pisi en la ĝardeno?'

Dank' al Dio, tio neniel rilatas al diboĉado, sed al nia bona najbarino. Li mem hontinde misuzis nian ĝardenon antaŭ la link-okulo de sinjorino Peeters, kiu, kvankam ĝenite de kurteno, malkovris ke ne estis kukurbo. Kaj tiam ŝi tuj prenis la plumon en la manon.

'Kial?', li insistas.

'Ĉar Johano ne estas leono.' Ĉar mi malŝategas la klasikan 'Tial'.

'Kaj se Johano ja estas leono?'

'Tiam Johano ĉiutage devas formanĝi ĉevalojn kaj la vostoj tiklus en lia gorgo.' Ĉar mi ne plu volas paroli pri tia vulgaraĵo, precipe ke ni nun ekriĉiĝas. Tiam mi preferas finaranĝi la aferon de tiu persista vosto kiel ajn.

Ŝajnas, ke li sentas, ke ĉi-foje mi decidinte kontraŭas kaj li denove atente rigardas la kovrilon de tiu skatolo.

'Ĉu ne estas sunfrapoj?'

'Ne, Johano.'

Nur nun mi komprenas, kial li ĵus ĵetis tiujn papiliojn al siaj leonoj kaj tigroj. Ĉar kiam estis tre varmege, mi avertis lin kontraŭ la suno kaj parolis pri sunfrapo. Kaj iom pli poste li enkuregis la kuirejon dolorĝemante: 'sunfrapo, sunfrapo'. Lia patrino formetis tion kion ŝi tenis kaj hastegis renkonte al li, post kio li montris al ŝi la koncernan sunfrapon, kviete sidanta sur blanka rozo.

'Ĉu sunfrapo havas piedojn?'

Ĉar sunfrapo estas kaj restas provizore laŭ li besto, io kio havas formon, enhavon, pezon kaj armilojn, kaj eble estas egale forta kiel la strat-rulpremilo. Jes, tiu frapo, kion vi ja pensas.

'Ĉu Johano neniam mortos?'

Ĉu la amara sorto de germanoj, ĉevalo kaj praavo pentigis lin?

'Ne, knabo, neniam.'

Mi sincere deziras, ke estu vere.

'Kaj se Dio batalus kontraŭ sunfrapo?'

Mi konstatas, je mia miro, ke ankaŭ la supera estulo aliĝis al lia kompanio kaj mi min demandas, kiu faris tion al mi. Feliĉe ke tiu sunfrapo nur estas forĵetaĵo, ĉar se estus kontraŭ lia leono, mi ne scius kion fari.

Sed liaj antenoj kaptis ion, ĉar jen li kuregas al la stratpordo, malfermas ĝin, kaj lia avino kiel velŝipo envenas, portante neta pakaĵo kies rozkoloraj rubandetoj li tuj ekmalligas.

'Ĉu la leonoj kaj tigroj ankaŭ manĝas

ĉokoladon?’, mi aŭdas lin demandi.

Al *mia* aflikto do venis fino kaj kun praavo mi alpaŝas la juniperbrandkruĉon. Lia mano iomete tremas dum ni tostas la glasojn kaj antaŭ ol sorbtrinki, li haltigas sian nebulan rigardon, kiu jam vidis pli ol ĝi ankoraŭ vidos, kiel benon sur sia pranepo.

Vi nun iom scias, kara Valtero, kion vi povas atendi. Memoru, ke *li* kondukas la dancon. *Li*, kaj ne iu alia, proklamis, ke tiu leono estas pli granda ol la mondo, ke ĉiuj germanoj estos formangĝitaj kun karno kaj ostoj, ke ĉevalo iom poste ankoraŭ facile povas esti aldonita, ke tiu vosto ne ricevas pardonon sed prokrastitan ekzekuton, ke praavo de tempo al tempo estas malŝveligita kaj poste ree plenblovita kiel balono, ke strat-rulpremilo estas strat-rulpremilo kaj ne maŝino, komprenite?, ke la ŝoforo ne dronas sed surveturos pavimŝtonojn ĝis la Lasta Juĝo, ke sunfrapo minimume havas krurojn kaj ke li mem eterne vivos kaj eĉ ĉi tie surtere. Kaj vi nur estas la senracia paroltubo per kiu li nun

ankaŭ en Parizo venas proklami sian doktrinon. Zorgu do, ke vi estu bone preparita, ĉar li verŝajne komencos dum li ankoraŭ surhavas sian ĉapeton. Vi estas sufiĉe saĝa knabo kaj mi kalkulas je via taktoplena pritraktado de lia akompano. Se vi vidas eblecojn por kompletigi ĝin per lokaj famuloj, des pli bone. Vi povus, ekzemple, provi onklinon kontraŭ la mano de praavo. Sed lasu ŝin tiam venkita, aliokaze li rezignos je tiu mano. Kaj se mi povus petegi vin, zorgu almenaŭ ke li nedifektite reportu sian kolekton, tiel kiel ĝi nun funkcias. Traktu nepre lian leonon kun la plej garda singardo kaj donu al li, do ja provizore, francojn por manĝi. Preteratentu tiujn feki kaj pisi kvazaŭ vi tion ne komprenas, tio estos plej bona. Sed ne lasu lin intertempe tute negardata, ĉar mi neniam kredas, ke li time rezignus pri praktika demonstrado en la Ludoviko XVa salono, se li konkludus, ke via malgrandanimeco tion nepre bezonas. Kaj se nia altrangulo je lia eniro ne tuj ekiras, demandu lin do preterpasante, ĉu praavo

antaŭ nelonge ne estis frakasita de strat-  
rulpremilo kaj ĉu li hazarde ĉi tie ne lasis  
ĉevalvoston. Tiam vi vidis.

Valtero, Valtero, faru vian eblon kun li kaj  
skribu vi nun ankaŭ iam ion al via amanta  
patro.

## 2

Vi ja devas resti informita pri kio ĉi tie okazas, kaj mi do ankaŭ sciigas vin, ke nia leondresisto, post restado kun sia patrino dum apenaŭ ses monatoj ĉe la bordoj de Vistulo, denove dum mallonga tempo kun sia patrino estas ĉe ni, ĉar ŝajnas, ke via fratino neniam eltenas pli longe ol ĉiufoje duonan jaron aŭ io tia sub la ĉielo de Pollando.

Mi kompreneble tuj esploris ĉu io restas de liaj sunfrapoj, maŝinoj de la trajno, strat-rulpremiloj kaj ĉevalvostoj. Nenio mankas al nia menaĝerio, kiu eĉ pligrandiĝis, ĉar la manon de praavo li propradecide definitive rekrutigis dum sia restado ĉe Balta Maro, kaj mi aŭdas de lia patrino, ke li pripensas promocii tiun manon al mezpeza boksisto. Ŝia malespera kapskuo klare montras, ke ŝi lacegas pro arbitraciado kaj nun fidas al mi. Sondado montris, ke ŝiaj deklaroj estis tute senpripensaj, tiel ke mi nun dum la unuaj

tagoj denove havos amason da laboro. Mi ja ankoraŭ iam sendos al vi raporton, por iom gajigi vin en Parizo.

Li jam parolas sufiĉe bone kaj li devas ja esti kuraĝa infano, aliokaze li jam delonge estus pasinta al silenta striko, prefere al ĉiufoja denova mergiĝo en alian bankuvon, ĉar li devas laŭvice ekparoli la francan, flandran, germanan kaj polan, kaj mi ne komprenas kiel li sukcesas distingi ilin kaj malebligi ke ĉio fandiĝu en kaoso kie neniu vidas lumon. Lia patrino parolas kun li jen france jen flandre. France ĉar ŝi parolas tiun lingvon kun sia edzo, ĉar ŝi ne tre bone scipovas la polan lingvon, kaj flandre kiam tiu knabo furiozigas ŝin, ĉar tiam ŝi aŭtomate uzas sian gepatran lingvon sen mem rimarki tion. La germana lingvo estas sekrete flustrita al li de liaj dancigaj stratkamaradoj kiel Klaŭzo, Vernerero, Frico kaj Guntĉjo. Li bone uzas tiun trian lingvon, kvankam li parolas ĝin kaŝe, ĉar lia patro estas polo, kiu tial devas atenti, ke oni ne rigardu lin kiel germaneman. Finfine la



polan, kiu ja devos esti lia oficiala lingvo, li hejme aŭdas de sia patro. Estas la lingvo kiu ĉefe estas uzata dum riproĉpredikado kaj punbatado, ĉar post oficeja laboro mia bofilo plejofte estas tre okupita submetigante lin al ordono, kvankam ĉiufoje estas nur pro la malicoj de unu tago. Ĉi tie ĉe ni li kompreneble aŭdas precipe la flandran. Kiam li alvenas de Dancigo mi atendas lin en la stacidomo kaj mi komencas jam sur la kajo, kiam mi lin akceptas tra la pordo, do dum monsinjoro ankoraŭ estas ŝvebanta. La unuajn tagojn li ja foje vortostumblas, sed helpe de sia germana lingvo li post unu semajno denove al kutimiĝas. Kaj ne daŭras unu monaton antaŭ ol li parolas tiom flue kaj dialekte kvazaŭ li pasigis kontinue siajn mil kvincent vivtagojn ĉi tie.

Ni devas koncedi, ke li havas neŝanceliĝeman karakteron kaj estas fiera kiel purrasa reĝinfano. Li opinias, ke ĉi tie ĉio estas bonega, kondiĉe ke oni silentu pri tio, kaj li do kviete povas ĝui la materiajn

kaj spiritajn aĵojn, kiuj estas abunde antaŭmetitaj al li de via patrino, fratoj kaj fratinoj, kaj ankaŭ de ĉiuj familianoj kaj amikoj kiuj regule venas rigardi kaj palpi lin. Mi certe eĉ ne devas mencii ĉi tiun aŭtoron, ĉar vi scias, ke tiu ne kutimas silenti.

Ĉio multe pli bongustas al li kiam li pensas, ke oni ne rimarkas, precipe manĝaĵoj kiuj mankas en Dancigo aŭ tie estas tro multekostaj por esti daŭre konsumitaj, kiel ĉokolado, marcipano, oranĝoj, ananasoj kaj la plej multaj varoj kiuj ĉi tie estas importitaj pere de ŝipoj de la maro. La samo validas pri la senbrida libereco je dirado kaj agado, kiun li ĉi tie povas ĝui ĝisfunde. Sed nun ne klopodu konfesigi lin, ke li tie ne ricevas ananason, ĉar tiam tio finiĝos malbone. Principe li nenion konfesas, kaj certe ne evidentaĵon. Kaj li prefere sufokiĝos pro la lasta ananaspeco ol perfidi Pollandon kiam ni ĉeestas. Li ne okupiĝas pri tiaj aferoj. Kaj tiu kiu tro longtempe insistas estas en danĝero ricevi

ian nefiksian objekton ĵetitan al la kapo. Li ŝajnas opinii, ke pri Pollando estas plej bone silenti, ke li kunvenis por entrepreni kun mi novan olimpikon, sed certe ne por informi tiun tutan kanajlaron pri la tiea lando. Kaj ke tiu kiu do volas ekscii pli pri Pollando ja nur prenu la trajnon por tie mem ĝin sperti. Krome li komprenas, ke ili estas absolute certaj, ke li tie ne ricevas ananason por manĝi, aliokaze la demando ja eĉ ne estus starigita, sed kial li, Johano *Maniewski-de-Gdinio-ĝis-Dancigo*, denove abunde nudigus tiun absceson? Por ke tiuj virinoj kaj viroj kolektive jubilu je tio? Li preferus vidi ilin ĉiujn mortfali, kiom ajn multnombre ili staras ĉirkaŭ li.

Demandoj devas esti direktataj al sinjoro tute simple kaj sincere, sen montri scivolemon, ĉar li travidas la plej malgrandan kaŝitan intencon kiel profesia diplomato. Kaj tiam li silente prezentas siajn kornojn. Kiu volas eltiri ion el lia sekreta sekurŝranko devas komenci per agraba interparolo, ĉar li malfidas

multokupitan foiron, ĉar li tiam ne havas superrigardon.

Kiam li hieraŭ kun mi vizitis onklinon Sofia, li donace ricevis de tiu ulino, Dio savu ŝin, kadukan lokomotiveton. Vere senvalora objekto, kiu eĉ ne volas funkcii kaj komplete sendefende starus kontraŭ la plej nula strat-rulpremilo. En si mem tio jam sufiĉe gravis, sed ŝi ne devintus pinĉi lin en la vangoj kaj ŝi precipe devintus silenti anstataŭ mokridante demandi, ĉu la infanoj en Dancigo *ankaŭ* ricevas tiom belajn aĵojn de iliaj praonkloj.

Li rigardis min kvazaŭ por demandi ĉu mi aŭdis tion, rigardis fikse tiun membron de nia familio kaj demandis ŝin kial ŝi havas tiom strangan vizaĝon. Kaj ŝi ja havas strangan vizaĝon, kiel vi scias. Ĉiam havis, sed dum la jaroj plistrangiĝis.

'Kion li diras?', demandis onklino, kiu ne povis kredi siajn orelojn. 'Ĉu li lernas tion en Pollando? Tiam li devas esti reedukita ĉi tie.'

'Pri tio ni multe okupiĝas', mi trankviligis ŝin.

'Ĉu vi kunportas la maŝinon, avĉjo?', li iom poste petis. Kaj tio signifis, ke mi, laŭ li, povis certe postlasi la aĵon ĉe la donacintino.

'Tamen testi kontraŭ tiu difektita horloĝo', li poste pripensis kiam ni sidis en la tramo. Tiu kaduka lokomotivo ja ankoraŭ ricevas roleton, kiel figuranto aŭ io tia. Jes, estas oportunisto en tiu infano.

Tie li estas edukata kiel princo, Valtero, ĉar via fratino rakontis kiom multe ŝia edzo strebas por ekde nun jam labori je lia aspekto, kaj Joĉjo devas do ankaŭ multe ekzerci en Pollando. La programo enhavas ekzemple: maĉi kun fermita buŝo, unue gluti kaj nur poste paroli, ensorbi supon sen fuŝi, manumi forkon per maldekstra mano, sidi rekte kaj senmove, ne meti fingrojn en la nazon, saluti sinjorinojn per mankiseto, ĝustatempe diri dankon en la pola kaj franca kaj antaŭ ĉio silenti dum la

plenkreskuloj parolas. Ĉu liaj kalkanumetoj dum salutado jam devas klaki laŭ pola maniero? Ne, ŝi diras, sed tio ja venos poste, tuj kiam lia alteco konformos kun militista sinteno.

Dum la instruado foje estas batado sen kompato, ĉar lia patro venas de la iama Prusa Pollando, kie la vipo estis uzita. Kiel ankoraŭ la tagon antaŭ lia elvojaĝo. Kiam Johano jam sidis antaŭ sia vaporanta supo, la patro ordonis al li unue ankoraŭ lavi la manojn, kion li rifuzis. La tagmanĝon tiam antaŭis longa improvizado per liniilo. Post ĉiu rifuzo, unufoje sur la malcedemaj manoj, kiujn li provoke lasis ripozi sur la tablo sen retiri ilin. Tiel oni atingis sume kvardek ses, kaj tiam estis tempo por foriri al la oficejo.

‘Kvardek ses batoj?’, demandis lia avino, kiu ĵetis rigardon al liaj pugnoj kie feliĉe nenio estas videbla.’ Kaj tio okazas dum vi rigardas? Fipatrino vi estas.’

Ne, ŝi ne nur rigardis, sed ŝi ne ĉion

rakontas al ni.

Kial li tiom obstine rifuzis estas ĝis nun ankoraŭ ne klarigita, sed lia patrino pensas, ke li ne konsentis pri tiu liniilo, kiun li certe konsideris kiel malpermesitan armilon, kiel ion kontraŭan al la mastrumaj kutimoj. Lia unua rifuzo naskis neatendite tiun bastonon, kaj tiu bastono plifortigis lin pri lia rifuzo. Mi ja foje volus testi tiun liniilon kontraŭ la mano de praavo, ĉar tiam ĝi certe dissplitiĝus, sed mi ne kuraĝas prononci la vorton 'liniilo'. Atendante pli bonan ideon, li ja denove eksidu en nia ĝardeno sen pantalono, ĉi-foje turnante sian kukurbon al Pollando, kiel la islamanoj al Mekko, sed tiam inverse.

Tamen ne klaĉu nun pri lia patro, ĉar li admiras sian patron kiel ĉion kio estas potenca. Ne multe malpli ol kun lia leono. Lia patro estas granda, lia patro estas forta, lia patro iras al oficejo, lia patro havas brakhorloĝon, lia patro surmetas gamaŝojn kaj lia patro estas polo.

'Kaj li uzas liniilon', diris lia avino, kiu cetere ja ŝajnis enprofundiĝinta en kudraĵeto.

La kompensado postulis duontagon. Ĝis mi finfine deklaris ke lia patro, laŭ mia opinio, eble estas egale forta kiel nia strat-rulpremilo. Li ruĝiĝis, ĉar li opiniis tion troigita, sed finfine akceptis tiun honoron kaj pro tio faris pacon.

Kelkfoje semajne ni kune ekskursas, prenas la tramojn kiuj faras la plej grandajn malrektajn vojojn, transpasas la riveron per la pramŝipo, nenial, kvazaŭ ni ĉiam ŝipveturis, kaj transe iras en buson kiu transportas nin reen tra la bele lumigita tunelo al la centro. Tie komforta angulo ĉe la *Paon Royal*, por mi biero kaj por li bongusta grenadino per trinkŝalmo, kun rigardo al la brua stacidomo kie estas multo por arbitracii. Finfine en taksio kaj hejmen kie plejofte atendas lin iu novaĵo. Kaj se ne, li do ja donas ankoraŭ ĉevalon al sia leono por formanĝegi.

Li konas ĉiujn tramojn kaj aŭtobusojn, scias



precize kie ni devas veturŝanĝi, kontrolas la rapidecon de ĉio kio veturas, esperas daŭre iun elreliĝon aŭ ĝuindan kolizion kun strat-rulpremilo kaj volas scii kien ĉiu ŝipo navigas. Vi komprenas, ke mi nomas ĉiujn havenojn kiujn mi konas, sed malgraŭ tio mi sendas amason da ŝipoj al Dancigo, tamen sen troigi ĉar li senĉese embuskas kaj li kaptas vin je la plej eta kontraŭdiro.

Malgraŭ tio, Valtero, mi pensas, ke lia restado ĉe ni baldaŭ finiĝos, ĉar el Pollando venas tro multaj leteroj. Mi ne certas, sed mi tamen supozas, ke Beneko repostulas sian edzinon. Ŝi ankaŭ venas tro ofte kaj ĉi-foje restas tro longtempe. Ŝi tiel lerte plenigas siajn tagojn ĉi tie ke ŝi ne nur por neniu estas ŝarĝo, sed iom post iom iĝas nemalhavebla, ĉar ŝi kudras, kuiras, helpas en nia mastrumado kvazaŭ ŝi intencas resti definitive. Se io kaŝiĝas en tio, tiam via patrino ja devas scii pli pri tio.

'Ĉu vi ne opinias, ke nia Adela...', mi klopodis ekscii.

'Kio?', ŝi bruske grumblis al mi, jam antaŭ ol mi fakte demandis ion.

Kaj tamen mi estas certa, ke ŝi min komprenis kaj ke ankaŭ ŝi samopinias, aliokaze ŝi lasus min finparoli. Ŝi ne volas aŭdi la demandon.

Pro lia baldaŭa foriro, mi hieraŭ faris novan pakton kun li, de kiu li tie povas vivi dum kelka tempo. Je la vespero ni promenis manenmane tra nia dezerta urboparko, tra-kotante en sekaj folioj ĝis super la maleoloj. Fore, lanternoj lumis, sed ĉirkaŭe, estis preskaŭ mallume kaj tombe silente. Mi haltis inter maljunaj fagoj kaj eltiris miajn poŝtranĉilojn, ĉar mi havas du. Unu deca por taga uzo kaj unu malnova por purigi mian pipon. La belan mi metis en lian manon kaj mem prenis la alian. Kaj tiam ni silente sed decideme foriris antaŭen, pelante ĉiujn bestojn kiuj ne estis. Kiam ni estis apud la pordego, mi levis lin kaj alrigardis momente.

'Nun ni estas kaj restas la viroj de la sekaj

folioj', mi diris.

'Jes', li flustris, 'kaj ne timemaj'.

'Pri neniu', konfirmis mi.

Tiam venis el Dancigo unua telegramo, kiu preskaŭ dum tuta tago kuŝadis malorde sur nia servoŝranko. La konata formularo, kiu plej ofte senprokraste per avidaj aŭ tremantaj manoj estas malfermita, restis kuŝante forlasita kaj ni preterpasis ĝin ne priparolante, kiel oni ignoras staketon da rubo. Vespere ĝi tamen malaperis, kaj tiam ŝi prenis la valizon el la kelo. La enpakado ja ne progresis, escepte de Joĉjo, kiu ĉiam estas preta por vojaĝi. La etan lokomotivon de onklino Sofia li ankoraŭ unu fojon turnis, kaj tiam ja metis kun la cetero.

'Ĉu ŝi reiras al sia edzo?', praavo laŭte demandis, palpante kompetente la valizon per sia peza mano, por kontroli ĉu nenio mankis al ĝi. 'La tempo do urĝas, ĉu ne, Franso? Ĉu vi diable lasus vian edzinon sola tiel longtempe?' Kaj tiam li ektimis, ĉar via patrino klakfermis pordon.

Nur post la dua telegramo ŝi finfine entreprenis la hejmvoyaĝon, post kio mi tamen trovis eblon iom paroli kun ŝi. Facilanime, laŭ tono de opereto, kie ĉio finfine bone finiĝas. Ĉu io mankis? Beneko ja bone gajnis sian vivpanon en Dancigo kaj lia diplomo ja donis al li belajn perspektivojn, ĉu ne? Jes, manĝaĵon ŝi ricevis. Tion ŝi cetere eĉ ne tre bezonis. Sed ŝia edzo opiniis, ke ŝi kondukis tro simple, ke ŝi ne sufiĉe ornamis sin. Li certe havis perspektivojn, ĉar en oficejo jam nun li ne plu sidis en la granda komuna salono, kie oni eĉ ne kviete povas grati kiam io jukas, sed en aparta vitra kaĝo, kie li eĉ rajtas fumi kaj el kiu li kordezire povas kriegi. Sed ju pli li promociiĝas, des pli li iĝas komercisto kaj des malpli edzo kaj patro. Laŭdire li foje daŭrigas hejme la kriadon kvazaŭ ŝi estus tajpistino kaj Joĉjo servoknabo. Eble pro kutimo, mi diris. Klaŭzo, Vernerio, Frico kaj Guntĉjo, kiuj laŭ ŝi formas humilan sed ĉarman kompletan, kun kiu Joĉjo multe amuziĝis, li nun trovas tro malaltvaloraj por sia filo, kiun li prefere

vidus en loĝlernejo, en Anglujo aŭ io tia. Li ne plu ŝatas ŝian pianludadon, sed li ŝatas ŝian supon. Nu, tio estas tamen io. Jes, ŝi diras, supo estas supo. Li ne ŝatas promeni kun ŝi en la ĉefstrato, ĉar ŝi ne estas sufiĉe ŝika, ŝi asertas. Ĉu li do ne plu amas ŝin? Certe jes, pli ol iam ajn, sed siamaniere. Pli freŝe ol iam ajn, ŝi volas diri. Li ne toleras, ke ŝi mem butikumu kaj pene portu pakaĵojn. Ŝi kontraŭe ne kapablas uzi sian servistinon kiel ĉarumon. Ŝi timas, ke li volus porti monoklon. Ekde iom da tempo li metas fojfoje kvinguldenmoneron ĉe sia dekstra okulo, sed ŝi pensis, ke estis ŝerce, ke li tiel klopodis instigi edzinon kaj infanon al ridado, ĝis ŝi malkovris, ke la nura viro kiu en la oficejo ankoraŭ staras super li fakte portas monoklon. Bone, sed ĉu tio ja tiel gravegas? Ŝi opinias ke *jes*.

Mi diris al ŝi, ke ŝi devas sin adapti, ke ŝi plej bone lasu forrazi tiujn brovojn se tio povas plaĉi al li, ĉar ne estas komplike, ke ŝi devas lerni ridi pri ĉio, parolante fari elegantajn gestojn sen kialo, ke ankaŭ ŝi

devas iom kriegi al liverantoj kaj servistinoj kiam ŝia edzo ĉeestas, ĉar tio eble impresas lin. Kaj tiun servistinon ŝi ja devas ŝarĝi kiel mulon. Ŝi provu. Cetere ŝi devas esti gajhumora, vivoĝoja kaj kontenta, ĉar ĉio aranĝiĝos.

'Jes', ŝi suspiris, kun la senespero de homoj al kiuj estas diritaj, ke ili ja revidos iliajn mortintojn en la postmorta mondo.

Dum la adiaŭo de via patrino, mi ne montris min, sed kiam estis tempo, mi kondukis Adela kaj infanon al la stacidomo, elektis du komfortajn sidlokojn kaj donis ankoraŭ iom da konsiloj.

'En la geedziĝo ambaŭ partioj devas plenumi indulgon.'

'Certe, patro, vi pravas', ŝi diris ridante kaj ŝia rigardo perfidis, ke ŝi nun ne nur konsideris min kiel veran amikon sed ankaŭ kiel ŝercemulon.

Mi tiam firme manpremis Johanon, kiel konvenas inter veraj viroj.

'Kaj ni estas kaj restas la viroj de...'

'La Sekaj Folioj', li kompletigis.

Mi pensas, Valtero, ke ĉio ja enordiĝos, sed tamen mi volus doni konsilon al Beneko, ke li ne aĉetu tiun monoklon, ĉar pri tio ŝi ne volus konsoliĝi. Ni, viroj, apenaŭ povas imagi kion tio precize signifas por virino, sed mi timas, ke por ŝi ĉio pri tiu monoklo estas grava. Se li volus porti ĝin nur en la oficejo..., sed imagu momente tiujn kvar ĉe la tablo, lin, ŝin, tiun infanon kaj tiun monoklon, kaj je la enlitiĝo, se li forgesas formeti ĝin ĝustatempe kaj tiel staras en piĝamo. Sed kion skribi? Nur menciigi la objekton jam estus militdeklaro, kiom ajn bele tio estus formulita. Tiam do prefere atendi, ĉar dum vivo estas, espero restas.

# 3

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi provversio de la verko. La kompletan verkon vi povas akiri ĉe [butiko@fel.esperanto.be](mailto:butiko@fel.esperanto.be) aŭ [www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be).



# 4

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi provversio de la verko. La kompletan verkon vi povas akiri ĉe [butiko@fel.esperanto.be](mailto:butiko@fel.esperanto.be) aŭ [www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be).

# 5

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi provversio de la verko. La kompletan verkon vi povas akiri ĉe [butiko@fel.esperanto.be](mailto:butiko@fel.esperanto.be) aŭ [www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be).

# 6

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi provversio de la verko. La kompletan verkon vi povas akiri ĉe [butiko@fel.esperanto.be](mailto:butiko@fel.esperanto.be) aŭ [www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be).

# 7

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi provversio de la verko. La kompletan verkon vi povas akiri ĉe [butiko@fel.esperanto.be](mailto:butiko@fel.esperanto.be) aŭ [www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be).

# 8

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi provversio de la verko. La kompletan verkon vi povas akiri ĉe [butiko@fel.esperanto.be](mailto:butiko@fel.esperanto.be) aŭ [www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be).

# 9

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi provversio de la verko. La kompletan verkon vi povas akiri ĉe [butiko@fel.esperanto.be](mailto:butiko@fel.esperanto.be) aŭ [www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be).

# 10

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi provversio de la verko. La kompletan verkon vi povas akiri ĉe [butikofel@fel.esperanto.be](mailto:butikofel@fel.esperanto.be) aŭ [www.retbutikofel.be](http://www.retbutikofel.be).

# 11

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi provversio de la verko. La kompletan verkon vi povas akiri ĉe [butiko@fel.esperanto.be](mailto:butiko@fel.esperanto.be) aŭ [www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be).



# 12

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi provversio de la verko. La kompletan verkon vi povas akiri ĉe [butiko@fel.esperanto.be](mailto:butiko@fel.esperanto.be) aŭ [www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be).

# 13

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi provversio de la verko. La kompletan verkon vi povas akiri ĉe [butiko@fel.esperanto.be](mailto:butiko@fel.esperanto.be) aŭ [www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be).

# 14

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi provversio de la verko. La kompletan verkon vi povas akiri ĉe [butiko@fel.esperanto.be](mailto:butiko@fel.esperanto.be) aŭ [www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be).

# 15

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi provversio de la verko. La kompletan verkon vi povas akiri ĉe [butiko@fel.esperanto.be](mailto:butiko@fel.esperanto.be) aŭ [www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be).

# 16

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi provversio de la verko. La kompletan verkon vi povas akiri ĉe [butiko@fel.esperanto.be](mailto:butiko@fel.esperanto.be) aŭ [www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be).



# Danke

Mi dankas Bert Boon, laŭ kies instigo mia patrino Ria Vandenweghe faris la unuan version de la traduko de tiu ĉi verko. Bert jam tradukis alian verkon de Willem Elsschot, nome „Kiel Vaglumoj”. Li helpis per specifaj frazoj de tiu ĉi verko kaj li komprenigis al mi, ke tradukado estas ankaŭ arta kreado.

Kiam mi transprenis la laboron de mia patrino kaj hazarde petetis iom da helpo al Yves Bellefeuille, mi ne povis imagi, kiom profunde li dediĉus sin al la tasko. Ne parolante la nederlandan lingvon, li ne povis kontroli la tradukon, sed povis des pli bone kontroli la gramatikon kaj forigi batavismojn. Li starigis multajn demandojn, faris amasojn da rimarkoj kaj senĉese faris proponojn, ne nur por plibonigi la gramatikon, sed ankaŭ por ke la teksto estu pli facile komprenebla.

Ankaŭ Gerd Jacques kaj Paul Peeraerts helpis plurfoje donante opinion pri vorto

aŭ frazo. Se tamen restus iu erareto, tiam kompreneble nur mi respondecas, des pli ĉar mi ne akceptis ĉiujn proponojn.

Mi dankas ankaŭ Cyriel van Tilborgh de la Willem Elsschot Genootschap (WEG) kaj Sander van Vlerken de la eldonejo Athenaeum, kiuj rajtigis al Flandra Esperanto-Ligo (FEL) eldoni tiun ĉi tradukon.

Fine mi dankas Lode Van de Velde, kiu finfaris tiu ĉi eldonon por FEL.

Veerle



---

# Notoj

1 Angle: “fair average quality” en la gren- kaj aliaj manĝokomercoj uzata por indiki kvaliton sufiĉe bonan por vendi.

2 Granda Ĉarto, latine Magna Carta, estas privilegia dokumento subskribita de la angla reĝo Johano, "Johano sen Tero", la 15-an de junio 1215. (Vikipedio)

3 La Tierpark Hagenbeck estas bestoĝardeno en Germanujo. La parko estis fondita de Carl Hagenbeck en 1907. Ĝi estis la unua bestoĝardeno kiu uzis malfermajn ejojn pli ol kradaj kaĝoj, por proksimiĝi al natura medio. (Vikipedio)

4 Aŭtodafeo: Publika punbruligo de herezuloj sur ŝtiparo. (PIV 2020)

5 Angle: Poentegaleco, precipe en futbalo.

6 Angle: Malofta situacio en diversaj konkursoj, kiam konkurantoj atingas la finon samtempe.

7 Germane: (mem)kompreneble.

8 La bluaj husaroj aŭ “Huzaren van Boreel” estas kavaleriregimento de la nederlanda Reĝa Armeo.

9 France: Jen.

10 Germane: Sinjorino konsilianino de Bielefeld. Tiu estis la Germana komercistino Caroline Oetker.

Kommerzienrat estas honora titolo donita al komercistoj en la Germana Regno ĝis 1919. (Vikipedio)

11 Germane: regiona tribunalo.

12 France: Saluton, avino.

13 France: La bona Dio.

14 Friedrich Fröbel estis germana pedagogo kiu fondis la unuan infanĝardenistan trejnejon kaj elpensis la terminon 'infanĝardeno'. (Vikipedio)

15 Germane: Ĉu la etulo estas ĉi tie? Jes, la etulo estis tie.

16 Germane: Dio mia!

17 Morbilo: Infekta febro, karakterizata de haŭtaj ruĝaĵoj kaj atakanta precipe infanojn. (PIV 2020)

18 Germane: Pri ĉio ĉi, nur vi kulpas.

19 France: Dankon.

20 France: Bonvolu.

21 Germane: Sinjoro Jesuo.

22 Vilhelmo la Silentulo estas alnomo de Vilhelmo la 1a de Oranje-Nassau. (Vikipedio)

23 Ĉako: Alta rigida kapvesto, uzata en iuj armeoj. (PIV 2020)

24 France: Tie ĉi ne estas Pollando.

25 La ora bovido estis, laŭ la Biblio, idolo por kontentigi la Hebreojn. (Vikipedio)

# Kolofono

**Titolo:** La leondresisto

**Aŭtoro:** Willem Elsschot

**Tradukis:** Ria Vandenweghe kaj Veerle Swartebroekx

**Kovrilo:** Lode Van de Velde (kaj Al)

**Reviziis:** Yves Bellefeuille kaj Paul Peeraerts

**Tekstaranĝo:** Lode Van de Velde

**ISBN de la papera eldono:** 978 90  
77066 81 2

**UDK:** 82.3.892

**NUR:** 301

**Leĝa depono de la papera eldono:**  
D/2024/2924/1

Flandra Esperanto-Ligo

Lange Beeldekensstraat 169 - 2060

Antwerpen

[www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be)

© 2024 FEL, Antverpeno

Kopirajto © 1940 Heredantoj A. De  
Ridder (Willem Elsschot)

Originala titolo: De Leeuwentemmer

Eldonita de Athenaeum-Polak & Van  
Gennep, Amsterdam